

Orgaan
van de Bond van
Arbeiders-
Esperantisten FLE

Laborista



Esperantisto

In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Nepveustraet 33 II, Amsterdam-17, telefoon (020) 82177
Peningmeester FLE, Wingerdweg 53, Amsterdam-19, postgiro 331133 - Libro-Servo FLE, Marnixstraat 57, Haarlem, postgiro 111278

Protokolo



Printempa suno bonvenigis nin kiam ni alvenis nian kongresurbon Utrecht. Post tre mallonga promenado ni trovis la kongresejon, kie ni jam atendis la k-do-*doj* Laborus kaj Levering, la sekretario kaj kasisto de OKK, kiuj glate faris la lastajn necesajn formalajojn post kiuj ni oficiale estis kongresano. Ni ricevis ujon (kiun donacis N.V. De Arbeiderspers), plenigitan per pluraj valoraj broŝuroj kaj faldfolioj en Esperanto.

Memkompreneble ĉiu renkontis amikojn, konatojn, kaj la „antaŭ-programa” tempo jam pasis en plej bona harmonio.

Je la tria horo precize — kiel anoncite en la programo — la aŭtobusoj forveturis por gvidi la kongresanojn tra malnova kaj nova Utrecht. Unue al Zamenhofdreef, kie pasintjare estas inaŭgurita monumento honore al d-ro Zamenhof. La prezidanto de OKK metis florbukedon kaj k-do Foeke de Vries per kelkaj vortoj skizis la taskon farendan de ni, speciale rilate al la enkonduko de Esperanto en la lernejoj.

Ĉiuj havis okazon admiri la kvinpintan stelon kaj poste denove ek en la aŭtobusojn. La kamaradoj Levering kaj Punt elokvente rakontis en la du aŭtobusoj pri ĉiuj vidindaĵoj kaj ni certe vidis multon pli en unu horo ol ni estus vidintaj en du tagoj, se OKK ne estus aranĝinta tiun ekskurson.

La vespero trovis kune en salono de „Erasmus-huis” ĉiujn kongresanojn. Krome ĉeestis nombro da gastoj, reprezentantoj de organizaĵoj kun ni simpatiantaj. La prezidanto de OKK, k-do De Greef, bonvenigis la kongresanojn. Li memorigis, ke en 1948 por la lasta fojo FLE-kongreso estas organizita en Utrecht. Tamen ne povas esti dirite, ke oni ne havas sperton en la organizado de kongresoj. En 1955 okazis tie la demonstraĵa kongreso de NCKE, okaze de la Zamenhofjaro. La pasinta jaro vidis aron da IFEF-anoj, kiuj okazigis la 18an kongreson en

pri la 46a kongreso de FLE, okazinta en Utrecht la 4an kaj 5an de marto 1967

„la centro de Nederlando”. Por la sekvonta jaro la membroj de SAT estos invitataj kongresi tie. Malsano de pluraj OKK-anoj kaŭzis stagnon en la prepara laboro, tamen oni opinias, ke venkitaj estas la malfacilaĵoj.

Transdonante la prezidantan martelon al la Asocia prezidanto, *k-do De Greef malfermis la 46an kongreson de FLE.*

K-do Foeke de Vries turnis sin al niaj gastoj ne-esperantistoj per kelkaj vortoj en la nederlanda lingvo. Li skizis bildon de la persono je kiu nia kongresejo estas nomita: Erasmus, kaj li komparis la signifon por la homaro de tiu persono kaj la internacia lingvo, en kiu komparo sin montras paralelaj ecoj.

Poste la Asocia prezidanto daŭrigis la malferman paroladon esperantlingve. La tuta enhavo troviĝas en la marta numero de LE.

Kiam la lastaj frazoj de la parolado — ne mallonga, sed de komenco ĝis plena de valoraj punktoj memorindaj — alvenis la aŭskultantojn, ĉiuj levigis por kanti komune la unuan strofon de „La Internacio”.

Kelkaj el la gastoj esprimis la deziron alparoli la kongreson; el ili la unua estis sinjoro *Verheul*, prezidanto de la sekcio Utrecht de ANMB (sindikato por metal-laboristoj). Propra sperto igis lin diri, ke vortoj devas esti parolataj rekte al la aŭskultanto, sen helpo de interpretistoj. La kapablon de tiu grupo li alte taksas, tamen pro la nekomparebla malfacileco de tiu laboro, kaj la ofte tre gravaj konsekvencoj de vortoj malbone, aŭ sen ĝusta vortnuanco prononcitaj, li forte pledis por la uzo de inter-nacia lingvo kia Esperanto. Li aludis la laborakcidentojn, kiuj ofte trafas eksterlandajn laboristojn precipe pro la manko de komuna lingvo. Sinjoro *Verheul* esprimis la deziron, ke la internacia lingvo estu disvastigita en mallonga tempo kun kiom eble plej multa apogo de NVV por nia

lando, por ke la internacia laboristaro pere de la Internacio de Liberaj Sindikatoj profitu la produkton de genia homo: Esperanton!

S-ro *Wieringa*, kiu parolis nome de la ĉefestraro de PvdA, demokrata socialisma partio, citis vortojn de profesoro Banning: la celo de l' socialismo estas ebligi al la homo esti homo. La samon oni povus diri pri Esperanto. Socialismo kaj Esperanto do havas komunan celon. Kaj precipe en la Asocio de Laboristaj Esperantistoj la parolinto retrovis rilatojn kun sia partio, pere de personoj kaj ankaŭ pere de la organiza strukturo kaj celo.

Sekvis reprezentanto de la Pacifismo-Socialisma Partio, la nova parlamentano *v. d. Lek*, kiu vidis rilatojn inter PSP kaj FLE koncerne la stereotipojn el la ekstera mondo. Ofte „oni” opinias, ke esperantistoj estas utopiistoj, kiuj kredas ke la uzo de internacia lingvo donos daŭran mondpacon. Samaj „oni” diras pri pacifistoj, ke ili kredas savi la mondon per absoluta senarmigo. Tamen esperantistoj kaj pacifistoj tre bone scias ke la ideoj, kiujn ili disvastigas, estas nur iloj por parta konkretigo de tiu sopirata, daŭra mondpaço.

La Asocia prezidanto respondis al la parolintoj per kelkaj vortoj kaj post la paŭzo salutis la kongreson diversaj reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj.

Ni nomu unue *k-do Pillenkamp*, kiu ĉeestis nian kongreson nome de la germana LEA. En la lastpasinta SAT-kongreso en Swanwick oni akceptis rekomendon al la diversaj LEA-oj sendi delegiton al la kongresoj de LEA-oj najbaraj, se tio iel eblas, por ke reciproke oni sciu pri la interna funkciado kaj laboro. *K-do Pillenkamp* atentigis pri la grandega evoluo — kvazaŭ revolucio — ĉiutere. La teĥniko en mallonga tempo ebligis nin libertempoj sur la luno, sed la homa menso ĝis nun ne transprenis la genian „eltrovon” de la internacia lingvo. Tamen: ni fidu La Estontecon — malgraŭ ĉio!

S-ro magistro *F. Winkel*, prezidanto de la Federacio de Esperanto-organizaĵoj en Nederlando kaj de la Instituto Esperanto ĉe la Instruado, laŭdis la kongresanojn pro ilia ĉeesto. Ili donas liberan tempon parte por la organiza laboro, parte por malstreĉo ankaŭ, sed entute ili ĉeestas por la bono de FLE. Ofte venas kritikaj

rimarkoj pri nesufiĉa funkciado de la kupolaj organizoj. Tie oni devas fari la taskojn, kiujn komune havas la fondintaj organizaĵoj, sed ili ne povas esti faritaj de kelkaj unuopuloj. Kritikantoj kaj ĉiu alia persono, kiuj povas helpi en la glata kaj daŭra funkciado de tiuj kupolaj organizaĵoj, nepre faru tion por ke en granda rondo harmonie ni atingu nian komunan celon.

Sekvis salutvortoj de s-ro Slot, nome de LEEN, kiu atentigis pri la kampanjo, organizita de IKUE, sed jam transprenita de la tutmonda esperantistaro, helpi en la okulkuracista laboro en afrikaj landoj. Li nomis tion plej belan propagandon kaj konsilis al ĉiuj subteni tiun ĉi kampanjon per mondonacoj kaj ankaŭ cetere fari nian propagandon per agoj.

Nome de Utrechts Esperanto Komité parolis s-ro Bergman, kiu memorigis la tempon de harmonia kunlaboro en UEK, kiam oni iniciatis la starigon de Esperantomonumento. Lia espero: tia kunlaboro daŭre ekzistu en UEK kaj ĝi estu ekzemplo por ĉiuj aliaj sekcioj kaj organizaĵoj kunlaborantaj.

S-ino Van Ieperen-De Vries, nome de KUNE, simbole komparis la florojn, kiuj ornamas la salomon, kun la diversaj Esperanto-unuiĝoj. La floroj estas diverskoloraj, tamen la koloroj kune harmonias. Tiel estu ankaŭ ĉe ni, esperantistoj, kiuj reprezentas diverstendencajn movadojn, tamen movadojn kun sufiĉe multe komuna por harmonie ekzistadi kune.

Post ĉiuj tiuj paroladoj, venintaj de profunde el la koro, la Asocia sekretario voĉlegis diversajn salutojn al nia kongreso. Inter li estis leteroj de la urbestro de Utrecht, NVV-Bestuurdersbond, Utrecht, Centrale Levensverzekeringbank N.V., la Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj, NIVON-Utrecht, SAT en Britio, SAT-Ameriko, Jugoslavia Esperanto-Ligo, la Plenumkomitato de SAT kaj la ĉefestraro de NVV.

Laŭ la tagordo devis sekvi la *elekto de voĉdonkomitato*, sed unuanime oni decidis ne perdi la tempon per instalado de ĝi. Certe ĝi ne funkcios ĉar mankas proponoj.

La tempo forflugis. Tiom interesa estis la enkonduko de nia prezidanto, tiom viglaj ofte la salutvortoj de la diversaj reprezentantoj kaj... tiom menso-malstreĉanta la bela muziko, kiun aŭdigis por ni la sinjorinoj Nonhebel kaj Baartwijk (al kiuj ree nian dankon!), ke pli rapide pasis la tempo ol ni opiniis antaŭ la komenco de la vespero. Tiel eĉ, ke la traktado de la sekretaria jarraporto ne plu povis okazi sabatovespere. Kiu flustris pri programo „malriĉa laŭ enhavo”? Jes ja, li malpravavis!

★

Dimanĉmatene unue la membroj de SAT kunvenis.

Je la 10.15a horo ni povis aŭskulti referaton de profesoro Minnaert, kiu prelegis pri „La internacia scienca kunlaboro en la astronomio”. Ne malmultaj el ni opiniis tian prelegon ne konvena en kongreso nia. Ĉu ne tro faka ĝi estos, kaj cetere: kiom el ni interesigis pri la astronomio?



Dum ni aŭskultis la malferman paroladon de Foeke de Vries.

La varman kaj fortan aplaŭdon, kiun ricevis profesoro Minnaert post sia prelego pruvis ke ni (jes, ni!) pesimistoj malpravavis, ne parte sed centprocente. Elokvente kaj sprite li gvidis nin al kelkaj steloj en la universo, al diversaj astronomiaj observatorioj en la mondo kaj fine al la komunikado de la diversnaciaj sciencistoj tiutere.

Pro tiu lasta punkto pli kaj pli konvinkitaj ni estis, ke ni ne ĉasas utopion, sed male, ke pere de la internacia lingvo ne nur pli da justeco estas donita al la homaro, sed simple — egoisme — ankaŭ pli da profito ekonomia kaj aliterena.

Ni ĝojas, ke la enhavo de la prelego baldaŭ estos preta por aperigo en LE. K-do Punt pretas prilabori ĝin kaj tiel ĉiuj povos ĝui tiun bonan kaj propagandefikan — ĉar trafan! — referaton.

Ĉu fine ni atingis la laboran parton de nia kongreso, kiam post la referato ĉiuj pretiĝis por la pritrakto de la dua punkto de niaj laborkunsidoj? Oficiale jes, sed ni ĉiuj opiniis, ke multon valoran ni jam aŭdis kaj priparolis en la antaŭaj kunvenoj.

Sekretaria jarraporto

Sin anoncis du kamaradoj por komentario. K-do Saaltink, Arnhem, laŭdis la enhavon de la raporto. „Literatura Kurso” li ĝoje bonvenigis kaj li esprimis la deziron, ke multaj abonu ĝin.

Pri porfunkciula kurso li ne certas, ke ĝi estas necesa pro la altaj aĝoj de niaj funkciuloj kaj ankaŭ pro la ofte jam longa sperto.

Li sugestis, ke sekcioj sendu siajn bultenojn al la Asocia estraro por ke la redaktorino de LE transprenu ĝenerale gravajn informojn.

Li atentigis pri la graveco de lokaj kunlaborkomitatoj, kiuj povas faciligi la laboron de FEN.

K-do Agosti, Amsterdam-5, ĝojis pri la iniciato inviti la edzinojn de la koncernaj funkciuloj al la Konsilantara Kunveno. Ne forgesu, ke estas multaj personoj apud niaj funkciuloj, kiuj per sia ĉiama preteco multe helpas la Asocion en ĝia funkciado. Respondis k-do Punt, kiu diris, ke en

FEN oni deziras ekfunkciigi personon, kiu speciale atentus la kunlaborkomitatojn.

K-dino Burgler, por Instrua Servo, bedaŭris, ke relative malmultaj kursanoj venas el niaj rondo. Iom pli propagandon nian propran instituton en propra rondo! K-do ten Hagen petis ĝustatempan anoncon de iu okazontaĵo en la sekcioj ktp. al la Asocia sekretario.

Unuanime kaj kun aplaŭdo la sekretaria jarraporto estas akceptita.

Financa jarraporto

Rilate al la financa jarraporto k-do Saaltink informigis pri la kondiĉoj financaj por tn. interŝanĝborsoj.

K-do ten Hagen klarigis, ke jam dum jaroj k-do Goslinga, kun helpo en Amsterdam de k-do De Groot, vizitas tiajn borsojn propagandecle. Ofte ili petas lokan helpon de niaj sekcioj. Vizitantoj de la borsoj foje interesigas pri Esperanto tiom, ke ili decidas sekvi kurson. Se poste ili fariĝos membro de la sekcio, tio fakte estas la frukto kreskinta el la borsa propagando. La financa subteno estu tiel: La vojaĝkostojn por k-do Goslinga pagu la sekcio, kiun ĝustatempe informis k-do Goslinga. Se la financa situacio de la sekcio ne permesas tian elspezon, ĝi petu subvenciojn de la konserna distrikto kaj se ankaŭ tie ne troviĝas mono, finfine oni povas sin turni al la Asocia kasisto. Sed estu certaj pri tio, ke ne sen fidinda informado pri via kasstato vi ricevos financojn de tiu plej alta instanco! Aldono de k-do Oosten al la financa jarraporto: li aludis la financon situacion post la kongreso en Gent.

Post la fino de la Asocia jaro ni ricevis la promesitan sumon de la komunumo Gent plus financon subtenon de Oost-Vlaanderen de kie venis — ne-atendite — donaco al nia kongreso en Gent.

Abonantoj ofte ne pagas ĝustatempe la kotizon, la samo okazas foje ĉe novaj ĝeneralaj membroj. Ne simple anoncu iun kiel simpatianton aŭ ĝeneralan membron, sed estu konvinkita pri la seriozeco de la kandidato, tio ŝparos tempon kaj monon. La kontrakto kun k-do Foeke de Vries finiĝos du jarojn antaŭ la planita dato, ĉar montriĝis, ke la kontraktanto plenumis

siajn devojn en malpli longa tempo ol estas antaŭvidite.

Ankaŭ la jarraporto de la Asocia kasisto danke kaj unuanime estas akceptita.

Jarraporto Libro-Servo

Krom du rimarkoj pri pli frua anoncado en LE por la diversaj festotagoj en decembro (k-do Lakemond, Apeldoorn) kaj pri eventuala plibonigo de la paperkvalito de niaj novjaraj kartoj (k-dino Bolding, Amsterdam-9) ĉiuj povis nur laŭdi la laboron faritan. La raporto do ankaŭ unuanime akceptiĝis.

La financa raporto de *Instrua Servo* sen diskuto trovis aprobon de la kongreso.

Kaj LA PROPONO (sen amendo!)? Neniu kontraŭstaris la proponon lasi la kontribuojn por la Asocio, tiel kiel ili estis ek de la oktobra monato 1966. (Do: f 0,85 monate por unuopaj membroj; f 1,15 monate por geedzaj paroj; f 11,40 jare por ĝeneralaj membroj; f 16,20 jare por ĝeneralaj membroj geedzoj.) Pft, ŝtono falis de nia koro, ĉar la tuta estraro timis la longdaŭrajn diskutojn, kiujn ĝi antaŭvidis rilate al nia proponaro....

Jam ni atingis la 6an punkton de nia tagordo: *estrarelekto*.

Ne estas nomitaj kandidatoj, kiuj povus transpreni unu el la funkcioj. La ĝis tiam funkcia estraro estis reelektebla (pro manko je aliaj personoj) kaj la kongreso elektis en iliaj funkcioj:

Foeke de Vries, prezidanto; F. B. E. ten Hagen, sekretario (Nepveustra 33", Amsterdam-W); V. Oosten, kasisto (ĝirnumero 331133, nome de penningmeester Bond van Arbeiders-Expectantisten, FLE, Wingerdweg 53, Amsterdam-N.); A. J. Bakker-ten Hagen, redaktoro de LE (ĉion por la redakcio oni sendu al la Asocia sekretario); k-dino A. Kwantes-Munnik, Libro-Servo (ĝirnumero 111278, nome de Libro-Servo FLE, Marnixstraat 57, Haarlem).

La ceteraj estraranoj reelektiĝis; ili estas: k-do A. M. D. Korff, Institucio Esperanto ĉe la Instruado; J. Ph. Punt, dua sekretario kaj FEN; k-do W. P. Siglé, membradministrado, adresoj LE, gratulagado, Asocia biblioteko; k-do J. W. M. Versteeg, administranto simpatiantaj membroj; k-dino I. ten Hagen, asesorino.

La Asocia prezidanto atentigis pri la 10-jara funkciado en la Asocia estraro de la

sekretario, k-do ten Hagen, kaj la kasisto, k-do Oosten.

Ambaŭ ili ricevis memoraĵon nome de la Asocio, akompanata de varma aplaŭdo de la ĉeestantoj.

La funkciuloj de *Konfliktkomitato* reelektiĝis.

Ĝi do konsistas el k-dino Bohlander kaj la k-doĵ v. d. Haterd kaj Winkel kun la deziresprimoj, ke estonte ili havus same multan laboron kiel en la pasinta jaro. La *Kaskontrolkomisiono* tiom bone funkciis en la pasinta periodo, ke la kongreso ree elektis la samajn funkciulojn: k-dino J. ten Hagen-Weerman, k-doĵn Bultemeijer kaj Oosterwijk.

Elekto kongreslokon 1968

Kvankam la situacio en la sekcio Arnhem estas sufiĉe malfacila, k-do Saaltink promesis pritrakti la deziresprimon, ke en Arnhem okazu nia sekvonta kongreso. K-do De Vries aldonis: la sugesto, organizi nian 47an en Arnhem, fakte estas por doni novan impulson al la iom stagnanta aktiveco. La sekcio baldaŭ informos la Asocian estraron.

Antaŭ ol fini la matenan programon, la Asocia prezidanto per kelkaj vortoj informis la ĉeestantojn pri planoj de la estraro. Li diris, ke la Asocia estraro dum tuta tago havis specialan kunvenon en kiu i.a. juna ekonomo montris financan spegulon. Li estas invitita en la Konsilantara Kunveno, kie ni aŭdis optimismajn sonojn. Montriĝis, ke per la financoj estantaj en nia Asocio, ni povus fari gravan kampanjon kun helpo de reklamoficejo. Sed... ĉu ni mem povus agi laŭ efikaj, modernaj metodoj? Pri tio estiĝis dubo kaj tial la Asocia estraro decidis proponi por-funkciulan kurson en kiu ĉiuj taskoj estu lumigitaj. Ĝi pensis pri ekzemple kvar regionaj kunvenoj, eventuale kun „postnaskiga helpo” en la sekcioj mem.

Post la tagmanĝo montriĝis, ke pluraj delegitoj estas surprizitaj pri la „propono”. Por ne tro influi la diskutojn nunajn, ni nur menciu la finan decidon: per cirkulero klare informi la sekciojn en kiuj oni preparolu la tutan aferon. Antaŭ certa dato (la 15a de aprilo) la komentarioj estu ĉe la Asocia sekretario.

En la libera diskutado kelkaj reprezentantoj kaptis la okazon paroli pri la kunlaborantaro. Ie ili bone funkcias, kaj aliloke male. Tamen ĉiuj opinias, ke la komitatoj estas utilaj kaj ke per digna konduto de ĉiu tiea funkciulo la komitatoj povas fari fruktodonan laboron. La parolintoj pri tiu ĉi temo estis: k-do Otten, Arnhem, k-dino Schouten, Haarlem, k-dino Minholts, Groningen, k-doĵ De Greef kaj Labordus, Utrecht, k-do Deichman, Rotterdam kaj k-dino Mol, Hago.

Cetera la k-doĵ De Greef kaj Rooke ree starigis la demandon ĉu alian daton por kongreso ni elektu estonte. Ambaŭ preferas pli malfruan daton.

Sed la Asocia sekretario respondas, ke la monato marto jam estas sufiĉe malfrua pro tio, ke oni preparolas laborjaron, kiu finiĝis antaŭ pluraj monatoj, dum la decidojn pri la „sekvonta administra jaro” oni faras fakte jam meze en la periodo mem. La reprezentanto de Amsterdam-12, k-do Schilperoord, korektas la membronombron de sia sekcio.

Alproksimiĝis la tempo de la adiaŭo.

La Majstro vivas!

Je la datreveno kvindeka al la morto de D-ro L. L. Zamenhof

„La Majstro mortis”,
diris siaj sekvantoj.
„La Majstro mortis”,
disportis la poŝtistoj la sciigon.
„La Majstro mortis”,
sonoris amare la liuto de la poeto,
printempe de la mil-naŭcent-
deksep’.

Ĉirkaŭ la tombo
tie staris ankaŭ siaj amikoj,
kaj oni larmis,
kaj oni ploris,
kaj oni ploregis,
kiam rultondradante falis
sur sian ĉerkon la nigraj terbuloj,
kaj mi krias nun tamen:
la Majstro ne mortis,
la Majstro vivas!

Li vivas en sia granda kreaĵo
en ĉi tiu la belsona lingvo,
kiun li allasis, kiel heredaĵon.
Li vivas en siaj belliteraturaj
li vivas en verkoj [verkoj,
de la esperantistaj verkistoj,
li vivas en la tradukaĵoj,
en la belliteraturaj gazetoj,
en la fakaj kaj sciencaj verkoj].
El multamiliono ekzempleroj
de la preskaŭ tridek-mil libroj
eĥas al ni sia nomo:
el multamiliono ekzempleroj
de la preskaŭ tridek-mil libroj
flagras al ni sia titana spirito,
anoncante, ke li vivas..

Jes, la Majstro vivas! ..
Ja ne sole en la libroj,
sed li vivas interne en la koroj,
en la junaj kaj maljunaj,
en la viroj kaj virinoj,
en la polaj kaj hungaraj,
en la francaj kaj hispanaj,
en la blankuloj kaj nigruloj,
maltrans la maro kaj trans la maro.

Ek do! Supren la kapon,
kaj flagru la verdastelaj flagoj
fiere kaj alte,
kaj sonure feliĉe ĉiuj lipoj:
la Majstro ne mortis,
la Majstro vivas! ..

Originala poemo
de Gyula B. Bérczessi

La prezidanto konkludis, ke la ĉeestantoj larĝgaskale havis la okazon esti informitaj pri ĉio kio tuŝas nian laboron; same ili povis informi la aliajn pri ĝenerale gravaj aferoj.

OKK meritas dankon de ĉiu kongresano pro la perfekta aranĝo: administre, en la salono, ĉie, pro kio ĉio glate iris. Dum forta aplaŭdo de la ĉeestantoj la prezidanto dankis ĉiujn kunlaborantojn kaj post la komuna kantado de „Fratoj al sun’” la 46a kongreso de FLE estas fermita. Ĝis 1968 en... .

Ans Bakker-ten Hagen

Noto de la Asocia estraro:

Eventualajn rimarkojn pri la protokolo oni bonvolu sendi al la Asocia sekretario (Nepveustra 33, Amsterdam-W) plej laste la 2an de majo.

La dokumentujo, kiun ricevis la kongresanoj enhavis:

- „Temoj” kun jarraporto kaj tagordo por la kongreso.
- folion pri la repago de vojaĝ-kaj restadkosto.
- aktualan broŝuron pri moderna aŭtomobilfabriko Fiat.
- Okcident Germana Revuo.
- Turismajn broŝurojn pri Amsterdam kaj Rotterdam.
- De Esperantist.
- sciigojn pri ceramik-industrio Ĉeĥoslovaka.
- faldfoliojn pri la Fervoja Muzeo en Utrecht, pri la tiea NV-Huis kaj planon de la urbo.
- reklamilojn de De Centrale Levensverzekeringsbank N.V.

Membro-administrado

Estas necese por la bona funkciado de la Asocio, ke la sekcioj ĝustatempe ensendu la membrolistojn. Ke ankoraŭ mankas io en tiu agado montras le sekvanta listo.

Amsterdam 3a	Den Helder
Antwerpen	Leiden
Breezand	Middelburg
Delft	Schagen
Dordrecht	Schiedam
Gent	Willebroek
Groningen	

Ĉi tiuj sekcioj ne sendis membroliston.

Je la fino de septembro (fino de la Asocia jaro) vi sendu kompletan liston.

Je la aliaj kvaronjaroj sufiĉas listo kun la membronombroj kaj ŝanĝoj.

★

Pri la gratulagado:

Mankas la informiloj de la sekcioj:

Amsterdam 1a	Haarlem
„ 3a	Den Helder
„ 5a	Laren-Blaricum
„ 8a	Rotterdam 1a
„ 10a	„ 2a

Antwerpen	Utrecht
Beverwijk	Wormer
Dordrecht	Zwolle
Gouda	

kaj de diversaj ĝeneralaj membroj.

La mankon vi mem facile povas konstati pro nericevo de gratulkarto kaj la sekretari(in)oj en sia kartoteko.

Bonvolu plej baldaŭ ordigi ĉion.

★

Uzu la *Asocian bibliotekon*. Katalogo kuŝas ĉe via sekretari(in)o, aŭ aĉetu ĝin po f 1.00. Riĉigu vian parolkapablecon pere de malgranda monelspezo.

★

En Heerlen (Nederlando) okazos la sekvanta trilandna renkontiĝo por esperantistoj, je dimanĉo, la 23a de aprilo 1967a, en salono de Restaurant Kras, Stationstraat 16, Heerlen (transe maldekstre de la stacidomo). Komenciĝo: matene je la 10a horo.

Ĉiu esperantisto estos bonvena en nia internacia rondo. Antaŭanoncado por partopreno ne estas necesa.

Pli da informoj (aŭ programo) estas akireblaj ĉe la korespondadreso, sinjoro H. Peters, Nobelstrato 57, Heerlen (Nederl.).

Manuskriptoj por iu numero de LE estu ĉe la Asocia sekretario plej laste la 26an de la antaŭa monato.

Se eble, bonvolu sendi ilin maŝinskribitaj, uzante nur unu flankon de la papero.

Kien en la libertempo?

Internaciaj FERIAJ Kursoj en Helsingör, Danlando, atendas vin de 23-30 julio.

Petu faldfoliojn pri tiuj ĉi jam famaj kursoj al: L. Friis, Ingemannsvej, Åbyhøj, Danlando.

Por la junularo:

Internacia Junulara Esperanto Seminario, organizita de Junulara Sekcio de Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato. Ĝi okazos apud Praha de la 8a ĝis la 16a de julio. Pliajn informojn oni akiru ĉe supremenciita sekcio, Praha 2, Blanická 4, Ĉeĥoslovakio.

Kvankam la longdaŭra malsano de Julio Baghy, „paĉjo” de la hungara Esperanto-movado, ofte timigis nin, tre subite venis la sciigo pri lia morto okazinta la 18-an de marto. Baghy ne nur kiel verkisto estis ŝatata, sed ankaŭ kiel homo, tion perfidas al ni lia karesnomo. Ĉar apenaŭ estas pensebla pli homa, pli intima alparolo, ol „paĉjo”. Liaj multaj amikoj — konataj kaj nekonataj — ĉion faris por plifaciligi lian vivon, por iom forgesigi la sufokan doloron de lia malsano. Lia granda amiko d-ro Kolomano Kalocsay faris ĉion eblan por plilongigi la fruktedonan kaj noblan vivon, bedaŭrinde vane. Li mortis, apenaŭ 76-jara.



Baghy estis bona verkisto kaj poeto. Li estris la lingvon perfekte, estis sprita kaj homama, ĉiama defendanto de la paco. Pri tio atestas liaj verkoj, en kiuj li preskaŭ ĉiam kapablas konvinki nin pri aferoj, kiujn li mem kredas. Lia klasika lingvaĵo estas facile komprenebla; la novelon „La Verda Koro” li dediĉis al siaj nederlandaj geamikoj.

La mortinto ĉiel klopodis plialtigi la spiritan nivelon de la esperantistaro, ĝustiel li iniciatis, ke la naskiĝtago de d-ro Zamenhof fariĝu tago de la esperanta libro.

Kvankam post la dua mondmilito li ne estis tiom produktiva, kiel en sia junaĝo, kelkaj libroj aperis de li. Ĉi suban poemon ni ĉerpis el lia nova libro, antaŭ nelonge aperinta ĉe STAFETO. E.B.-J.

Fraulino Mulder forlasis la Ekzamenan Komitaton

En la pasinta jarkunveno de la Ekzamena Komitato ĝia sekretariino-kasistino, fraŭlino H. M. Mulder, anoncis sian ekŝigon. Kiu el la kelkaj miloj da iamaj kandidatoj ek de 1935, ne memoras ŝin, la organizinton de niaj ekzamenoj? Ĉiu kandidato ja kontaktas kun la ekzameno unue pere de ŝi!

Pri tiu organizado oni ne pensu supraĵe! Antaŭ ol la prezidanto precize je la 10a horo malfermas la ekzamenon, okazis multe da prepara laboro, pri kiu oni ne multe konscias. Kaj post la fermo je la 5a horo komenciĝas nova laboro daŭranta ĝis la kandidato ricevas sciigon pri sukceso aŭ malsukceso. Kaj en la tuta laboro f-ino Mulder fervore aktivis!

En la lasta tempo okazis nur unu ekza-

Deziro de Grandveziro

Turka fabelo

Dum konsiligo en divano ekstaris grandveziro; „Indulge donu, ho sultano, permeson por foriro! Rigardu tien en angulo kun glavo negro staras; mi sentas, tiu maliculo min buĉi sin preparas. Ekster muroj de Bagdado distanco estus ŝirmo; ordonu al mi por agado en fora urbo, Smirno!”

★

La suvereno en angulon rigardis tuj defie, sed li ne vidis la fremdulon. Neniu staris tie. „Vi, grandveziro, estas laca post longa tempo serva; vi indas do por vivo paca en Smirno malpli verva.” Sed post foriro tuj klariĝis, ĉe vid’ li ne eraris, ĉar en angulo videbligis: kun glavo negro staris.

★

„Kiel ci venis, hej, pagano, tra gardo de V eskorto?!” „Mi estas, sciuj, ho sultano, anĝelo de la Morto.” „Ĉu venis ci por min ekbuĉi aŭ mian grandveziron? Mi pretas, sed li por rifuĝi al Smirno prenis iron.” „Lin trovi tie ĉi, mi miris; Bagdad ja estis ŝirmo. Al mi ordono Allah diris; mortigu lin en — Smirno!”

(Unu el la poemoj, kiujn kune prezentas „Ĉielarko”, la lasta-perinta verkaro de Julio Baghy, eldonita de Stafeto.)

meno jare, sed mi memoras jarojn kun 4, 5, 6, eĉ kun 8 ekzamenoj, kies preparoj kaj ellaboroj interplektiĝis!

Dum tiuj 30 jaroj mi havis la plezuron intime labori kun f-ino Mulder: longan tempon kiel Prezidanto, poste kiel simpla ekzamenanto. Kaj mi devas aldoni, ke la kunlaboro en la Komitato okazis ĉiam glate kaj agrable. Ni povis senrezerve fidi pri ŝia aktiveco.

Kaj nun ŝi foriris. Kvankam mi devas respekti sian decidon, mi kun bedaŭro premas al ŝi adiaŭe la manon, dankante ŝin pro la multa laboro modele farita. Samtempe mi kore bonvenigas la novan sekretarion-kasiston, S-ron G. Ellerman. Mi deziras al li multan sukceson!

F. Faulhaber

LINGVA RUBRIKO

POR LA PROGRESANTO

Redakcia komitato:
E. BURGLER, F. FAULHABER,
H. KUIJT, J. W. MINKE,
J. PH. PUNT, C. P. WESTERVELD
Redakcia adreso: E. BURGLER,
Sportstraat 62, Amsterdam-Z.
aprilo 1967

ALVOKO

al la landaj Esperanto-organizo kaj ties lingvaj institucioj kaj al la redakcioj de la Esperanto-gazetoj

Estimataj samideanoj!

En la internacian lingvon Esperanto estas jam enkondukitaj kaj daŭre enkondukataj pli kaj pli da novaj radikoj (neologismoj), kiuj ne estas necesaj, ĉar sufiĉas la ĝisnunaj radikoj kaj afiksoj. Kelkfoje eĉ aperas pluraj novaj radikoj por unu sama ideo, ekzemple: malproksima — dista, ferna, fora, lontana, tela... Tio malfaciligas la lingvon ne nur por lernantoj sed ankaŭ por progresintoj kaj subfosas la kunmetan karakteron de Esperanto, kiu estas ĝia plej granda preferaĵo. Ĉu vere ĉiu rajtas preni el sia gepatra lingvo (aŭ de „fremdvorto“ al li konata) novan radikon kaj kuzi ĝin en Esperanto sen kontraŭstaro de la disciplinema esperantistaro?

En la lasta tempo rimarkeble laŭtiĝis la voĉoj admonantaj pro tiu senbrida multobligo de la Esperanta vortaro. Tio konfirmas la laŭfundamentan sintenon de la Aŭstria Esperanto-Instituto, kiu jam dum multaj jaroj insiste petadis la Akademio de Esperanto, averti kontraŭ necesaj neologismoj aŭ almenaŭ deklari sian opinion pri tiu grava problemo. Sed la sinsekvaj prezidantoj de la Akademio rifuzis tion aŭ senkulpigis sin pro tempomanko, kvankam ili trovis sufiĉan tempon por okupi sin verve je malpli gravaj problemoj, ekzemple tiu de „ata - ita“.

La Aŭstria Esperanto-Instituto tial en kunsido okazinta la 26-an de oktobro 1966 decidis ne atendi plu respondon de la Akademio de Esperanto, sed mem ekagi. La Instituto tute ne volas arogi al si ion „oficialigi“ aŭ „malpermesi“, sed ĝi laŭ sia statuto sentas sin rajtigita rekomendi la uzon aŭ neuzon de novaj radikoj, parolturnoj ktp. La Instituto tion faros nur post severa ekzameno en ĉiu kazo. La Instituto kiel landa institucio donos tiujn rekomendojn antaŭ ĉio al la geesperantistoj en Aŭstrio; tamen ĝi, konsiderante, ke la Internacia Lingvo devas esti kaj resti la sama por ĉiuj esperantistoj, sin turnos al ĉiuj esperantistaj organizoj, redakcioj ktp. kun la peto helpi kontraŭstari la malfaciligon de Esperanto por ĉiam novaj necesaj radikoj.

Sed la Aŭstria Esperanto-Instituto ne nur petas la fratajn organizojn kaj redakciojn publikigi tiujn rekomendojn, ĝi ankaŭ esperas ilian subtenon kaj kunlaboron en diskutindaj kazoj. La Instituto atente studos ĉiujn alskribojn kaj respondojn kaj utiligos ilin por la rekomendoj. Ĝi kompreneble ankaŭ volonte akceptos instigojn por sia laboro.

Esperante ankaŭ vian konsenton kaj subtenon, ni subskribas samideane por la

AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO
Reg. Kons. E. Werner Dr. L. Grimme
Sekretario Direktoro

En januaro 1967.

LA AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO REKOMENDAS:...

Jam dum jardeko la Aŭstria Esperanto-Instituto petadis la Akademio de Esperanto publikigi sian opinion pri la ĉiam pli ampleksa uzado de — necesaj — neologismoj en la internacia lingvo Esperanto. Tio koncernas antaŭ ĉio la anstataŭigon de la „mal“-vortoj per neologismaj radikoj, ekzemple anstataŭ mallonga *kurta* aŭ anstataŭ maljuna *olda*. La sinsekvantaj prezidantoj de la Akademio ne respondis la demandojn de nia Instituto sed elturniĝis per alitemaj kontraŭdemandoj. Ili kaj la ceteraj akademianoj intertempe ankaŭ energie diskutis kaj disputis pri la tielnomata „ata-ita-problemo“ kvazaŭ le ekzisto aŭ neekzisto de nia lingvo dependus de la demando, ĉu iu diras „iu domo estis konstruata aŭ konstruita en tiu aŭ alia jaro“, dum ili pretervidas, ke ekzistas jam du „Esperantoj“ laŭ vortuzo. (daŭrigota)

NIA LIBROSERVO VOLONTE
LIVERAS VIAJN STUDLIBROJN.
PETU INFORMOJN.

Ĉu Esperanto vere vivas?

J. Ph. Punt

VERTALING VAN OPGAVE 3

Antaŭ nelonge Ludoviko Velleman, la brusela korespondanto de „La Libera Popolo“, detale intervjuis tiun klerikon. Ĉiu racie pensanta homo ne povas ne plene aprobi — kaj subteni — la noblan laboron de tiaj homoj. Per instiga broŝuro la iniciatinto de la kampanjo petas por kunlaborado. Li konsilas komenci la taskon ankaŭ se oni nur nebene parolas la anglan lingvon, ĉar tiu ja estas la lingvo de la nigraj usonaj homfratoj. Kiel devizon li havigas al la kunlaborantoj la ĉinan proverbon: „Pli bone estas ekbruligi kandeleton, ol malbeni la mallumon“. Modeste mi tamen volas atentigi lian patran moŝton, ke jam dum 75 jaroj la esperantistoj konas kaj tenas lumanta tiun kandeleton. Kaj feliĉe ne sensukcese. Esperantisto laŭ la vera senco de la vorto neniam diskriminacias.

La klopodado de patro Pire, Maddy Tolud kaj la sennombraj aliaj estas necesa kaj havu nian plenan aprobon, sed sen komuna lingvo, kiu egalrajtigas ĉiujn mondĉivitanojn sen distingo pri haŭtkoloro, religio kaj vivkoncepto, la tuta penado restos duona laboro.

Konu la leĝon, sed apliku ĝin prudente.

Regulo 15 de Plena Gramatiko de Esperanto diras: „La t.n. vortoj fremdaj, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo.“

Jen unu el la paragrafoj de nia Lingva Konstitucio. Problemojn ĝi ne aŭ apenaŭ povus prezenti. Tiu konstitucio estas fidinda konsilanto. Tamen... ne ĉiu fidinda konsilanto havas la forton kaj la aŭtoritaton de leĝo.

Pri tio mi pensis, legante la vortojn de k-dino Mia Maatman pri la traduko *Kodo* kaj *kodvortojn* por *code* kaj *code-woorden* en „Ĉu Esp. vere vivas?“ de januaro 1967. Tiu k-dino diras, ke Plena Vortaro plus ties suplemento ne prezentas tiujn vortojn laŭ tiu senco. *Kodo* estas *kolekto da leĝoj*. Tio estas pura vero.

Nu, P.V. estas fidinda konsilanto, sed tio ne implicas, ke ĉiu vorto el ĝia enhavo estas kanonika kaj ke vorto ne sin trovanta en tiu esperantista biblio estas apokrifika.

La vorto *kodo* devenas el la latina. *Codex* estas la malnova nomo de leĝaro. Tiu vorto *Codex* estas singularo (ununombro) kaj plurale (multenombro) ĝi tekstas *codices*. En la nederlanda *kodo* estas: Sistemo de interkonsentitaj liter- aŭ cifergrupoj, po prezentantaj vorton aŭ frazparton, ĉu kiel sekreta lingvaĵo, ĉu por redukti la koston de telegramo, ĉu por klasifikaj celoj.

En la franca ĝi havas la signifon *leĝaro*, sed *codetaal* estas *langage codé*. En la trafiko *se mettre code* estas *dimmen* kaj *dimlicht* estas *phare code*.

En la germana, same, la signifo estas *leĝaro*, sed ankaŭ tie *Kode* estas *geheimschrift*. Cetere en tiu lingvo *Wetboek* estas ankaŭ *Gesetzbuch*.

La angla diras *Code of law*, do, *kolekto da leĝoj*, sed ankaŭ *codeword* (kodvorto). La hispana lingvo havas sian *el Código Civil* kaj metafore *Código* estas kolekto da reguloj kaj interkonsentoj. Traduki en kodon en la hispana estas *traducir en clave*, (clave, la franca clef kaj nia ŝlosilo). Miaopinie do la vorto *kodo* estas taŭga en la senco de mia uzo.

Ne ekzistas la danĝero pri kreado de homonimoj. La senco de la vorto en la kunteksto ne povas kaŭzi miskomprenon. Por *nylon* senhezite diru aŭ skribu *nilono*. Ja neniu ekhavos la impreson, ke temas pri *ono de (la rivero) Nilo*. Se mi dirus *tio estas agrabla informo*, oni nepre ne pensus pri *ino kaj formo* aparte.

Tiurilate ankoraŭ la jenon. *Voorrangsweg naar Esperanto* estas tradukita *Privilegia vojo al Esperanto*. Miaopinie la vorto *privilegio* ne indikas *voorrang*. Tial mi turnis min al prof. Waringhien, demandante ĉu li aprobus la vorton *prioreca*. Li respondis jese, malgraŭ tio, ke la vorto *priore* estas la titolo de iuranga kleriko. Rilate al la leĝoj oni povas diri, ke la homoj interkonsentis, ke en certaj kazoj ili uzu certajn regulojn kaj preskribojn. Tre bone komprenebla tio estas en la trafiko. Tie oni vastaskale aplikas la t.n. piktogramojn, t.e. ideojn skribitajn per bildoj. Por ekzemplo: Kvadrata blua tabulo kun sago la pinton ĉielon estas la bildo por la frazo: unudirekta strato kie enveturado estas permesita, inversi direkton ne permesite.

Kaj fine; ĉu *kodvorto* estus la unusola traduko? Nepre ne! Tre bone oni m.o. povus diri *formulo*.

Iom detale mi traktis ĉi tiun aferon por prezenti skizon pri la procedo ĉe la kompilado de traduktaskoj. Cetere mi kredas, ke artikolo 15 de nia gramatiko estas fidinda vojmontrilo. Mi esperas, ke en kazoj de dubo niaj legantoj tuj turnos sin al la redakcio. Punt

„La ti-ti-enigmo” ne estis malfacila,” skribis unu el la partoprenintoj al nia konkurso, „nur la vorto „ihtiosaŭro” kaŭzis iom da serĉado en P.V.” Tamen kelkaj el vi ne bone atentis la priskribon de la 7a vorto kaj uzis *arimetiko* anstataŭ *matematiko*. Mi renkontis ankaŭ aliajn miskomprenojn: stilistiko ne estas „scienco pri la deveno de la vortoj” (etimologio). *Mokinsulti* anstataŭ *kompromiti* ne estas trafa redono de la koncepto: „ĵeti malbonan famon sur ies reputacion.” *Malkrediti* ankaŭ ne respondas al tiu postulo. Unu el niaj Belgaj amikoj uzis „*kristaligi*” anstataŭ *efektiviĝi*. Tiu verbo foje kaj konvenokaze signifas „realigi”, tamen mi ne akceptis ĝin, ĉar la vorto donas „ta” en la loko de „ti”. Mi ne estis kontenta pri „*afliktitaj*” anstataŭ *kompantinda*, sed mi vere bedaŭras, kamarado, ke vi dediĉis preskaŭ plenan tagon nur al tiu sola vorto!

Entute 27 solvojn mi ricevis, nome de S. Aarse; J. H. Bredenoord; Geedz. W. v. d. Broek; B. Busscher-Tuin (dankon pro via amuza klarigo!); L. Bruijn-Bas; J. Derieuw; N. J. v. Dijk; J. R. v. Eynde; J. F. Foquet; H. Hooghuis; J. G. v. Hulst-v. Maasdam; J. Kesselring; H. Keuter; J. Kuijpers; Mia Maatman; Syfke Musch; S. Rademaker - Amsterdam (bonvenon! precipe pro tio, ke vi estas samsekciano mia); J. v. d. Rhee; Geedz. Rodenhuis-Boll; J. S. Rooke - Ermelo (bonvenon en nia mezo!); Erik E. Salberg el Primošten (Jugoslavio!); F. Smit; P. J. v. Tol; R. Vos-Uil; E. Weiberle; P. Wolfs kaj de S-ino A. Reiné el Eindhoven, kiu estis laŭre kronata per unu el la belaj premio-libroj. Koran gratulojn al ŝi!

Mia Maatman petis min kompili kriptogramon. „Nederlandlingve mi tre ŝatas ilin” ŝi skribas, „sed en Esperanto ili ŝajnas al mi preskaŭ nesolveblaj. Tamen iam vi povos aperiĝi malgrandan?” Efektive, tiaj enigmoj ne estas facile solveblaj. Esence la malfacilaĵo kuŝas en kernecaj priskriboj kaj mi ne estas certa, ke mi posedas la talenton por tia peza laboro. Tamen mi akceptis la spiton. Nu, vi mem juĝu. Jen mia unua *kriptogramo*:

1		2		3		4
	5	6				7
8				9		
10						
11						

Horizontale: 1. vi devas vadi tra neĝo por trovi tiun multekostan materialon; 5. Komence Ben konfuzis la verbon „tani”; 8. prenu for de via fingro kaj sufikso aperas antaŭ viaj okuloj; 9. ĝuste ĉar mankas la fina litero, mi restas bakaĵo kiam vi turnas min; 10. se la atuto estas el la kabineta vorto, ne eblas plu fari vestojn; 11. kia modo!

Vertikale: 1. mi opinias „triarba” kaprica vorto; 2. la angla biero estis forigita el la

OPGAVE 4

1. Eén enkele krant was ook veel praktischer, denkt elke bezorger.
2. Nu moet hij zorgvuldig op alle huisnummers letten.
3. Op nummer 28 wil een heer een socialistische krant lezen, op nummer 30 een rooms-katholiek blad en nummer 32 wil een liberaal orgaan.
4. Dat kan toch veel praktischer.
5. Alle mensen eten alle dagen verschillend voedsel.
6. Op nummer 40 eten ze vandaag erwtensoep, op 42 macaroni, op 44 snijbonen.
7. Wanneer iedereen zich nu eens hield aan een van regeringswege voorgeschreven menu van de dag (eventueel met keus uit vijf menu's), dan kon alles goedkoper en praktischer in centrale keukens worden bereid.
8. Maar nee hoor, we denken er niet over.
9. We zijn merkwaardig tevreden over de privézpot, ook al beslist slechts één gezinlid, de huisvrouw, over de inhoud.
10. Ik wilde maar zeggen, we waren al zo wijs, om niet al te praktisch te zijn. Laten we het zo houden.

VERTALING VAN OPGAVE 3

1. Ni ne fariĝu tro praktikemaj.
2. Pilolo, garantiante ke ĉiuj homoj ekhavos la saman longon, estus sendube enorme utila, pensu pri la vestaĵindustrio.
3. Estus multe pli praktike, se ĉiuj aŭtomobiloj, domoj, malvarmigaj ŝrankoj, oficejoj kaj preĝejoj estus egalaj.
4. Sed ni oscedus pro tedo sur tia tero.
5. Kiam estas la homo plej feliĉa? Kiam li okupas sin ne-praktike, faras senutilaĵojn, malŝparas energion.
6. La vivo estas plena de nepraktikaj situacioj en kiuj ni havas plezuron.
7. Pensu pri Amsterdamo.
8. Pro praktikaj konsideroj la tuta centro devus esti forrompita.
9. Oni devus anstataŭigi ĝin per moderna urbo.
10. Sed ni ne faras tion! Ni daŭre faras. Tiel ni estas multe pli feliĉaj.



anĝelo, sed restis la galo en la vosto; 3. en kanon mi kaŝis la ŝtufon; 4. „lia koro estas lia roko” respondis la pastro en la nomo de la diaĵo; 6. ĝi ne estas modo en „u” sed simple radika vorto en „u”; 7. radike mankas al mi nenio; mi estas kompleta.

Jen! Mi estas scivola viaj pri reagoj. Ne devigu min por donaci la premion al Mia Maatman nur ĉar ŝi estas la sola, kiu povas deĉifri enigmon en tiu ĉi mistifika formo. Ne lasu min kuŝanta en kriptiko kun nesolvebla enigmo en la manoj. Se vi havas solvon, sendu ĝin al J. W. Minke - Veeteelstraat 144 - Amsterdam-6, plej laste 15.5.67.

OPGAVE 4

Welke Nederlander kent er niet de door de natuur geschapen strook heuvelachtig land, de duinen genaamd, die het daarachter gelegen lage land zo afdoende beschermt tegen de zee. Voor duizenden jaren is deze strook te voorschijn gekomen uit zee en door woeste winden en sterke stromen water geworden tot de oneffen soms diep doorkliefde hoogten. Daar, waar deze beschermende hoogte niet is, dreigt altijd gevaar; steeds weer bleek dat door mensen gemaakte waterkeringen nauwelijks bij machte zijn voldoende bescherming te waarborgen. Het is dan ook een grote noodzaak dat de duinstrook met grote zorg wordt omgeven. Men plant er helm, een diep wortelende grassoort, om verstuivingen van zand tegen te gaan. Kwetsbare delen zijn afgeschut om ondergravingen en allerlei beschadigingen door mensen en voertuigen te voorkomen. Grote gedeelten staan onder bewaking, mede om toe te zien op de naleving van het rookverbod op begroeide terreinen. Het geheel staat onder controle van een speciale dienst. Deze strook land is voor de bewoners van Nederland van onschatbare waarde en is de grote zorg die besteed wordt aan onderhoud en bewaking alleszins waard.

VERTALING VAN OPGAVE 3

Songante li vidis sin irante tra la stratoj de la granda urbo kaj nur kiam li eniris alian straton, li rigardis malantaŭ si al la ĝendarmoj, kiuj ekscititaj en vico postkuris lin. Lia timo kreskis, ĉar la distanco inter la ĝendarmoj kaj li de minuto al minuto pli malgrandiĝis. Fine li saltis post pordon kaj kuris supren laŭ la ŝtuparo. Li ne precize sciis kion li ŝtelis. La ĝendarmoj vokis lin kaj li miris pri tio, ke ili ĉiuj scias lian nomon. Li aŭdis, ke ili malantaŭ li eniras tra la dompordo kaj bruiras supren sur la ŝtuparo. Li trovis la mansardan fenestron, malfermis ĝin kaj grimpis eksteren. Kiam li postrigardis, jam venis tra la fenestro la kapo de iu el la ĝendarmoj. „Vi malbona ŝtelisto”, diris la ĝendarmo. „Vi fia homĉasisto”, li rediris. Sed la ĝendarmo ŝovis sin plue tra la fenestro kaj diris: „Nun vi estas kaptita!” Li staris apud la rando de la tegmento kaj rigardis la profundan stratfendon malsuper li. Malantaŭe li sentis la etenditan manon de la ĝendarmo, ankoraŭ unufoje rigardis malsupren, faris paŝon trans la randon de la tegmento kaj sentis sin falanta. Estis mallonge antaŭ la unua horo nokte kiam li kun kriego vekigis sub gruo en la haveno de la urbo.

ESPERANTA MOZAIKO

de F. Faulhaber donas respondon al multaj viaj demandoj. Aĉetu ĝin ĉe nia Libroservo, kaj ĉefe: trastudu ĝin.

Kio estas agado E 3?

Nia mondo nombras ĉ. 15.000.000 blindulojn, el kiuj ĉ. 10.000.000 estas *necesese* blindaj. Ili loĝas ĉefe en Afriko. Nesufiĉe estas konate, ke la plej multaj el ili povus vidi, se oni povus doni la necesan helpon pere de operacio aŭ medikamentoj. Sed tio kostas monon, multan monon. Estas kulpigo kontraŭ „nia” civilizacio, ke milionoj da blinduloj restas blindaj pro manko de helpo. Nia helpo. Se blindeco minacus nin, ni vojaĝus ĉiufanken por serĉi resaniĝon. Kaj ni ne pensus pri mono, ĉar temas pri niaj okuloj... La famkonata okulkuracisto Prof. D-ro H. J. M. Weve, pripensis planojn por organizi helpkampanjon. Pro sia morto en 1962 li ne povis realigi ilin, sed liaj amikoj daŭrigas lian laboron pere de institucio, portanta lian nomon, kiu celas okulkuracajn helpojn al blinduloj en afrikaj landoj evoluantaj. Ĉi tiu helpado havas karakteron ne nur preventan kaj kuracajn, ĉar la laboro direktiĝas ankaŭ al nekuraceblaj blinduloj kaj al tiuj, kiuj malbone vidas.

Kion faras la institucio?

La Prof. Weve Institucio donas financon subtenon al porblindula lernejo en ALUOR (Kenio). Urĝe necesas brajlo-presejo apud tiu lernejo. La nova projekto jam estas preta, sed la realigo kostas monon! La Institucio deziras elsendi multajn okulkuracistojn por instrui la teknikon de katarakta operacio, havigas okulkuracajn instrumentojn kaj fakliteraturon al kuracistoj en Afriko. Ĝi kontaktiĝas kun registaroj kaj diversaj instancoj por solvi la multajn ĉi-koncernajn problemojn.

Dek „steloj” kaŭzas miraklon!

Kiam D-ro Sampimon laboris ĉe la gento Masaj'a, la rektaj kostoj de unu katarakta operacio estis malpli ol dek „steloj” (ned. guld. 2,50)... Per tia monsumeto malfeliĉa homo fariĝas iu, kiu povas perlabori sian panon! Ĉiu el ni havas la moralan devon kolekti la necesan monon. Nur tiam ni povos grandskale prezenti helpon al tiom da necesese blindaj homoj! Per la prezo de du skatoletoj da cigaredoj ni povas feliĉigi kunhomon. Estas okulistoj en Afriko, kiuj faras 50 kataraktajn operaciojn en unu horo... El ĉi tiuj 50 pacientoj estas almenaŭ 49, kiuj post la operacio kapablas kulturisianjn kampojn kaj prizorgi sian brutaron!

La iniciato de IKUE

La pasintan jaron la estraro de IKUE demandis al si, ĉu la esperantistoj eble povus fari ion. Kaj komenciĝis kampanjo, kiu ŝajnas fariĝi granda sukceso, ĉar neantaŭvidita entuziasmo eksplodis... Estis d-ro L. L. Zamenhof, la pola okulkuracisto, kiu en 1887 sub la pseŭdonimo ESPERANTO prezentis sian lingvon internacian al la homaro. Ĉiu esperantisto scias, ke li helpis prefere malriĉajn pacientojn. Li ofte faris tion senkoste. Opinianta, ke la idealo de la Prof. Weve Institucio estas simpatia en la vidantaj okuloj de ĉiu vera adepto de nia okulkuracisto, mi venis al ideo, kiun mi unue proponis al la membraro de IKUE. Ĉar jam envenis multaj mondonacoj de esperantistoj nekatolikaj, mi ne povas plu paroli pri „kampanjo de IKUE”, sed te-

mas nun pri agado de la tuta esperantistaro... La kostoj de unu katarakta operacio sumas ĉ. ned. guld. 2.50 (dek „stelojn” aŭ iom pli ol ses internaciaj respondkuponoj). Ĉu estus eble, ke ĉiu esperantisto, kiu havas du vidantajn okulojn, pagus almenaŭ unu operacion, ekzemple kiel dankesprimon honore al D-ro Zamenhof? Ĉu ni kune kapablus redoni la lumon al almenaŭ mil afrikaj blinduloj? Ĉu ankaŭ ne estus belega gesto flanke de la tuta esperantistaro donaci al afrika lando evoluanta D-RON ZAMENHOF KLINIKON por okulmalsanuloj?

ANKAŭ VI POVAS HELPI:

- per internaciaj respondkuponoj
- per uzitaj poŝtmarkoj
- per malnovaj okulvitroj
- per malavara mondonaco

ANKAŭ VI POVAS DONI ESPERON AL AFRIKANO, kiu esperas vian simpatian helpon. Se vi faras, kion vi povas, vi komprenis, kio estas Agado E3: esperantistoj esperigas esperantojn!

JACQUES TUINDER,
Van Hulststraat 1,
TER APEL (Gr.) Nederl.

ONI POVAS PAGI AL:

- J. A. Tuinder en Ter Apel (Nederl.), girokonto: 10 20 100
- Nederlandse Middenstands Spaarbank en Ter Apel (Nederl.), girokonto: 82 42 08; menciu: AGADO E3
- Prof. D-ro Weve Institucio, Groot Haesebroekseweg 12, WASSENAAR, (Nederland), girokonto: 20 18 00 (en tiu kazo vi bonvole sendu vian nomon al J. A. Tuinder en Ter Apel!)

AGADO E3 sendos la tutan mondonacon de la esperantistaro al la Institucio la 15-an de decembro 1967a!

Faulhaber-fondaĵo

Kun danko ni kvitancas mondonacojn por la fondaĵo de:

- k-dino G. W. Siglé, Amsterdam .. f 5,—
k-dino M. E. van Buuren-de Vries,
Haarlem f 2,50
k-dino H. A. Postma-Albada,
Amersfoort f 6,—
k-dino Heuvink-Willemsen, Arnhem f 2,50
k-dino T. van Duffelen, Alkmaar .. f 2,50
k-dino W. Pangere-v. Riessen,
Zwolle f 2,50
k-do H. van Hulst, Haarlem f 1,70
k-do W. van Bodengraven f 1,90
k-do A. Lakemond, Ugchelen f 5,—
k-do J. D. Delwig, Arnhem f 2,50

Donacoj por FLE

Mondonacojn por la propaganda kazo de nia Asocio ni ricevis de:

- k-do A. v. d. Hey, Groningen f 1,—
k-dino Daems-Maurice, Brussel .. f 1,20
k-do F. J. Verschoor, Arnhem f 0,50
k-do G. Wijnia, Rhenen f 0,60
k-do Heinhuis, Wormerveer f 10,—

Plej koran dankon al ĉiuj!

Radioservo FEN

Kwelderstraat 46, Leeuwarden

BBC provizore daŭrigos la Esperanto-elsendojn (por Bulgarujo). La lastan jaŭdon de la monato de ± 22,30a ĝis ± 22,40a horo. Ondolongoj: 30,7 m, 41,3 m, 50,1 m (9770, 7260, 5990 kHz). Bedaŭrinde en Nederlando ĝi estas tre malfacile kaptebla.

PRAHA denove elsendas (dum por-Germanujo programo) ĉiun merkredon de 9.30a ĝis 9.45a horo je 31,6 m kaj 49,6 m (9509 kaj 6055 kHz).

VIENO ŝanĝiĝis. Nun elsendas ĉiun vendredon de 15.30a ĝis 15.40a horo je 25,5 m kaj 203 m (11785 kaj 1475 kHz).

ROMA plimalfruiĝis. Nun elsendas dimanĉe de la 21.00a ĝis la 21.20a horo. Krome oni aldonis ondolongon: 50,08 m (5990 kHz). W. Böttcher

Pola Radio Gdansk

organizas ekspozicion pri Esperantaĵoj kaj petas pro tio kunlaboron de la esperantistaro tutmonda.

Jam dum ses jaroj radio-elsendejo en Gdansk prizorgas Esperanto-disaŭdigojn (nuntempe de 7.45 - 7.55a horo matene — mezeŭropa tempo — 230 m.) kiuj estas aŭskultataj en multaj landoj.

Se vi disponas pri materialo, rilatante programojn de radiostacioj kiuj elsendas en Esperanto, fotoj de redakcia stabo, fakte ĉio kio rilatas la radion, bonvolu sendi tion al:

Pola Radio Gdansk, „Esperanto kaj Vi”, Pollando.

Ankaŭ gratulleteroj estas bonvenaj.

PTT-anoj atentu!

En 1966 oni fondis „La Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Asocio”.

Fondintoj estis reprezentantoj de Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Pollando, Francio, Rumanio kaj aliaj.

Ĉu Nederlando sekvas en tiu vico?

En la Amsterdama Poŝtdistrikto oni monate eldonas organon „Postaal”.

Ni klopodos enpenetri en tiun organon per nelongaj artikoloj el diversaj landoj por pruvi la taŭgecon kaj veki intereson rilate al Esperanto.

Informojn vi sendu al k-do W. P. Siglé, Patroclossstraat 28”, Amsterdam-9.

Recenzo

Ripozoj

Dumonata, multkolore ilustrita, 48-paĝa revuo — la plej luksa en la esperanta mondo. Abonu ĝin, ĉar en momento de ripozoj sur la paĝoj de „Ripozoj” vi trovos ne nur varian legaĵon en perfekta lingvo, sed ankaŭ valorajn informojn pri Bulgario: internacia turismo, kultura vivo, historiaj monumentoj, unikaj naturbelajaĵoj, marborda feriado, sporto, folkloro, filatelio, esperanta movado, lingvaj demandoj k.a.

Por elekti la landon kaj la lokon de viaj feriaj ripozoj, konsultu „Ripozoj”!

„Ripozoj” publikigas senpage adresojn en la rubriko „Korespondado”.

Eksterlandaj esperantistoj, vizitantaj Bulgario, estas bonvenaj en la Redakcio de „Ripozoj”.

Abonu „Ripozoj” kontraŭ \$ 3.00 aŭ egalvaloro.

Sumojn sendu al: Redakcio „Ripozoj”, bulv. Tolbuhin 51, Sofia, Bulgario, aŭ al nia Libro-Servo, poŝtĝinnumero 111278.

GELDERLAND
Havikstraat 3, Arnhem

Ja le 21a de majo 1967 ni aranĝos tn. „familian tagon” en la feriejo Het Lierderholt en Beekbergen, de ± la 10a matene ĝis la 16a horo posttagmeze. Kvankam ni ankoraŭ ne disponas pri kompleta programo, ni jam nun invitas la esperantistojn kaj familianojn, el kaj ekster nia distrikto, pasigi la supremenciitan dimanĉon kun ni en Beekbergen.

Ad Otten, sekr-ino

El la sekcioj ★

AMSTERDAM 8a „Liberiga Stelo”
Bertelmanstraat 20, tel. 737783

La gemembrojn de nia sekcio ni invitas por partopreni niajn konversaciajn vesperojn. Ili okazas nuntempe regule ĉe k-do A. Rust, Herculesstraat 85, la duan kaj la kvaran merkredon el la monato, vespere je la 8a h. Tiu ĉi sciigo estas evidente necesa, ĉar multaj membroj el nia sekcio neniam pro kiu ajn kaŭzo, vizitas niajn konversaciajn vesperojn. Ni konsilas al vi, liberigu vin je unu el la nomitaj merkredaj vesperoj, vizitu nian rondon kaj partoprenu nian klubvivon. Vi certe ne bedaŭros tion.

W. Bohlander, sekr-ino

ARNHEM
Buysstraat 30

La 4an de marto, tagon post sia naskiĝdato, mortis maljuna membrino de nia sekcio, k-dino W. G. Timmers-Bakker. Ŝi aliĝis al nia sekcio la unuan jaron de ĝia starigo kaj seninterompe restis fidela al ĝi. La lastajn jarojn ŝia sanstato ne plu ebligis aktive partopreni en la organiza laboro, tamen ŝi restos en nia memoro kiel fervora defendanto de nia lingvo.

J. W. Saaltink

★

Ni atentigas pri la sekvontaj konversaciaj vesperoj de sekcio Arnhem:

La 20an de aprilo: Sennaciulo de marto.
La 27an de aprilo: Frazoj sur la nigra tabulo.

La 4an de majo ne okazos konversacia vespero, pro ĉiel-irtago.

HAARLEM
Neptunusstraat 39

La 27-an de aprilo k-dino Schouten prelegos pri „La Taglibro de Anne Frank”, kortuŝa aŭtobiografio eminente tradukita de Degenkamp.
Post la paŭzo k-do Van Hulst gvidos la konversacion.

HAGO

Niajn hagajn membrojn kaj ceterajn interesigantojn ni nun jam atentigas pri la distra programo, kiun prezentos la teatra grupo.

Ĝi okazos la 21an de junio en la salono Vredekerk, Markelostraat 113, Hago. Salonmalfermo 19.30a horo, komenciĝo je la 20.00a horo.

La salono estas atingebla per linio 15 aŭ 25 ĝis haltejo Almelooplein. Enirprezo f 1.—

AMSTERDAM
Curiestraat 22hs

Fraŭlino E. Wekker parolos por ni la 30an de aprilo pri: „Mia vojaĝo al Surinamo”. Kiuj ne plu memoras la ĉarman prezentadon pri siaj impresoj dum la vojaĝo al la kongreso en Tokio?!

La antaŭajn jaron al la ĉeestintoj ŝi preparis neforgeseblan matenon.

La vojaĝo al Surinamo estos same interesa! Precipe el la buŝo de tiu nia samideanino, kiu konas Surinamo'n kiel sian propran dik-fingron.

Tiom pli valora estos la rakontaĵo, ĉar Surinamo estas ne por ni iu neklara lando. Kontraŭe, ja ekzistas pluraj ligiloj inter ambaŭ niaj landoj!

Kun scivolemo ni rigardas al la mateno, kiam ŝi rakontos pri sia vojaĝo. Eble ŝi klarigos al ni, kial al la Reĝaj Moŝtoj la popolo de Surinamo ĉiam preparas tian koran akcepton?

D. Veen, sekretario

★

Pro malsano de k-do D. Veen, laŭ peto de la Amsterdama SAT-rondo, mi transprenis lian taskon aranĝi komunuan vojaĝon al la 40a SAT-kongreso, en Malmö.

Se vi deziras partopreni la komunan vojaĝon, mi petas anonci vin kiel eble plej baldaŭ, laste antaŭ la unua de majo. Kun via aliĝanonco samtempe pagu parton de la kostoj, po f 50,— por persono. Kiam estos sufiĉe da anoncoj, mi aranĝos du karavanojn:

a. Tiuj, kiuj volas unu semajnon, ili forveturos vendredvesperon la 28an de julio 1967 per Nord-West Expres laŭ Putgarden-Kopenhago kaj reiros sabaton la 5an de aŭgusto.

b. por tiuj, kiuj deziras du semajnojn, ili reiros sabaton la 12an de aŭgusto.

Pri la vojaĝkostoj por trajno kaj kuŝejo vi povas legi en marta LE, sed tiuj prezoj estas provizoraj.

Vian pagon faru per Poŝtĉekkonto n-ro 13500 Gemeente Giro Amsterdam, ten gunste van H. 1543, mevr. J. ten Hagen-Weerman, Nepveustraata 33, Amsterdam-17. Post la unua de majo, kiam mi scios la

nombron da partoprenantoj kaj detalajn informojn pri trajnoj, boatoj kaj prezoj, mi informos vin per cirkulero.

Atentu bone, ke ĉi tio servas nur por la komuna vojaĝo al Malmö. Vi aparte anoncu vin por la SAT-kongreso, ĉe la landa peranto, k-do C. van Essen, Floretstraat 10, Rotterdam. Legu la kongreskotizon en marta Sennaciulo. Unu usona dolaro egalas f 3,60. Post la 31a de marto validas plialta kongreskotizo.

J. ten Hagen-Weerman

ROTTERDAM
2e Pijnackerstraat 12a

En februaro ni havis, dank' al k-do Coppens, tre agrablan matenon. Same en marto ni ĝuis la diapozitivajn kaj rakontojn de k-do Regt.

Al ambaŭ kamaradoj ankoraŭ dankon!

Nian lastan kunvenon de ĉi tiu sezono prizorgos k-do W. Quispel. Li aŭdigos sonbendon de la lasta SAT-kongreso en Swanwick. Certe agrabla mateno nin atentos.

La kunveno okazos la 30an de aprilo, dimanĉmatene, je la 10.30a horo. Ĉiuj estos bonvenaj.

Ankoraŭ ni dankas ĉiujn kunlaborantojn de ĉi-tiu sezono, kaj precipe al k-dino Vollegraaf, kiu ĉiam atendis nin kun bongusta kafo. Al niaj membroj ni deziras agrablan someron kaj ĝis septembro!

M. Bout-v. Veen, sekr-ino

SAT-JUNULFAKO

La Gejunula Postkongreso.

De iu k-dino mi ricevis leteron en kiu mi legis, ke la gejunula postkongreso okazos en Råå, loko en la apudeco de Hälsingborg, kiu situas kontraŭ Helsingör en Danio.

Tiuj, kiuj intencas viziti la kongreson kaj ŝatas resti duan semajnon, povas anonci sin por tiu postkongreso ĉe: k-dino C. Lindkvist, Rabygatan 30, Malmö, Svedio.

Pluraj sciigoj pri kostoj ktp. ankoraŭ ne estas konataj. Vi do informigu pri tio ĉe la suprenomita adreso.

Corrie Kooij
Franselaan 270b, Rotterdam

Ĉu vi deziras fari ekzamenon?
Ĉu vi volas refreŝigi vian scion?

JUS APERIS :

ESPERANTA MOZAIKO

artikoloj kaj prelegoj de F. Faulhaber

El la enhavo ni mencias: Iom pri tradukado — Esperanto, la Latino de la demokratio? — Lingvo vivanta — Iom pri lingvaj leĝoj — La interliga valoro de nia literaturo — Lingva kontrolo — Ĉu „ci” aŭ „vi”? — La signifo de la fundamento — La absoluta partecipo — Idealismo, fideleco, persistemo — Nekonata, neŝatata — Verku simple kaj klare! — Ni revivigu niajn klasikulojn — Juĝu mem! — Kun ruĝa krajono — ktp.

Prezo: f 4.50. Mendu ĉe nia Libro-Servo, Marnixstraat 57, Haarlem, poŝtĝirnumero 111278.

